

& Senkompata oktobro:

<Rekante 11 el 23 batoj por strofo, entute 161 paŝoj dum 2 minutoj. Verkis Mikaelo Bronŝtein (2014). Baladigis Martin Strid (2015) per nova rekantaĵo kaj melodio inspirita de sveda polso "Vargpolska" (Lupa polso).>

(#Melodio:

<:23> (

/DoMi FaaFaLa SoFa; MiSo doomimi reTi; SoTi faafami redo; TiLa SooFaFa MiFa;

(#Rekantaĵe: doSo SoMi; SoSo SoFa FaRe; Mi DoMi SoFa ReMi Do o)

)×7)+

(Strofoj:

'1 Senkompata oktobro ; miajn rozojn
mortigis. ; Senkompata oktobro ; mian
koron pretigis.

(×: **Paŝu takte ; kaj ne tro barakte. ;
Morgaŭ plu venos nova tag'.**)

'2 al la blanka baldaŭo, ; kiu venos kun
vento, ; al la vintra longdaŭro ; ekde
frua novembro.

'3 Mi ankoraŭ dancete; la ĝardenon
pilgrimas. ; Mi ankoraŭ falsete ; viglan
kanton enrimas,

'4 sed jam rampas serpente ;
malvarmeto animen, ; sed jam tro
alisente ; vortoj venas enrimen –

'5 pigre, malinterese, ; enuege atakas. ;
Ĉu mi tiom altpreze; miajn rozojn
pritaksas?.....

'6 Ho, ĉe sojlo de l' vintro ; bedaŭrindas
la perdo! ; Sed la vivo jam min tro ;
bone ŝarĝis je sperto.

'7 Certas mi: pli ol plendo ; nun valoras
la movo, ; post tagaĉoj de splen' do ;
venos taŭga bontrovo.)